

Alexander Puschkin,  
Ex unue leonem

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Elsputis foje kelkajn versojn mi  
Kaj sen subskribo donis tiujn ĉi  
Al gazetulo ilin kritikanta,  
Skribaĵon sian ankaŭ ne signanta.  
Utilis mia ŝmiraĉaĵ' al li  
Ne pli ol mia sekretad' al mi.  
Ekkonis li leon-ungegojn miajn  
Kaj same mi azen-orelojn liajn.

*Traduko de la Rusa poemo "Ex ungue leonem" de ALEXANDER PUSCHKIN (\*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-151-1 / Arg-762-1530 (2013-01-06 13:36:41)*

*Mi, Manfred Retzlaff, verkis tiun ĉi esperantigon laŭ germanigo farita de Martin Remané. Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Aleksandr\\_Pu%C5%9Dkin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Aleksandr_Pu%C5%9Dkin).*